# Jura Semajno

**Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio**

**Decembro : 4 2021**


## MALTO APROBAS LA KONSUMON DE MARIĤUANO (KANABO)

La pasintan 14-an de decembro, la Parlamento de Malto, malgranda insularo en la Mediteranea maro, permesis teni kiel maksimume 7 gramojn da mariĥuano, drogo farita el sekigitaj floraroj de la ina kanaba planto. Same, oni rajtigas al plenaĝuloj kultivi kiel maksimume 4 plantojn de kanabo por propra konsumo. Se iu posedas pli grandan kvanton da drogherbo, tio jam estos konsiderata kiel delikto, punita per 100 eŭroj (113 usonaj dolaroj).



La nova leĝo permesas la fondiĝon de asocioj, kun ne pli ol 500 membroj, tie estos eble produkti kaj vendi inter la membroj tiun drogherbon.

Laŭ la malta ĉefministro, S-ro Robert Abela, per ĉi tiu leĝo oni deziras solvi problemojn kaj eviti riskojn ligitajn al konsumado de mariĥuano. Tiel, konsumantoj ne provizos sin je ĉi tiu drogherbo ĉe "nigraj merkatoj". Same, ĉi tiu leĝo, laŭ la ĉefministro, evitos al junuloj deklari antaŭ juĝisto aŭ tribunalo pro la simpla ago, ke ili fumis kanabon.

La politika opozicio de Malto voĉdonis kontraŭ tiu nova leĝo, pro la fakto, ke drogherba konsumado tutcerte pligrandiĝos en la Malta insularo post la decido de la Parlamento. La nova leĝo ankaŭ konsideras la kreon de nacia aŭtoritato pri taŭga konsumado de kanabo.

Kelkaj eŭropaj ŝtatoj, inter ili Nederlando, Hispanio kaj baldaŭ Luksemburgio kaj eble Germanio, jam permesas la konsumadon de malgranda kvanto da tiu drogherbo, ĉiam ĉe privataj ejoj. Tamen komerco kaj konsumado en publikaj lokoj estas tute malpermesitaj.

# *Vorto de la Semajno*

**Administri** (tr): Prizorgi la aferojn de persono aŭ de organizaĵo, ekzemple pri financoj kaj havaĵoj.

*La ministro pri ekonomio administras la riĉecon kaj rimedojn de la ŝtato.*

*Li administris dum sia tuta vivo la terpecojn de sia patro.*

- **Administro, administrado:** ag(ad)o de tiu, kiu administras.
  *Bona politikisto observas la regulojn de bona administrado.*
- **Administra:** rilata al administrado.
- **Administrejo:** loko, kie la koncernatoj plenumas administradon.
- **Administristaro:** aro de administrantoj.
- **Administracio:** publika funkcio, konsistanta en la aplikado de leĝoj kaj plenumado de publikaj servoj konforme al juraj preskriboj de la registaro.

  *Ministroj realigas sian politikan programon kun la helpo de la administracio.*



Ni invitas niajn jurajn samideanojn al legado de nova numero de la revuo **VENTO,** la nura en Esperantio kiu pritraktas veksilologiajn (flagsciencajn) temojn. Ĵus aperis la numero 10-a! Ĉi tiu numero, kaj tiuj naŭ antaŭaj, estas libere kaj senpage alireblaj ĉe: www.esperanto.ac/vento

